

Vilna Sonoro



N-ro 1

Sabato, 23-a de julio 2005

Tage +17 +19

Nokte +10 +12

Redakteja retadreso: kuriero@esperanto.lt

Kongresa Kuriero de la 90-a Universala Kongreso en Vilno, Litovio

Bonvenon al Vilno!

Ĉefurbo iĝas ĉefurbo.

La ĉefurbo de Litovio iĝas ĉi-jare la ĉefurbo de Esperantujo. Vilno kaj Litovio jam delonge meritigis gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto. Estas feliĉe kaj signife, ke fine okazas la kongreso 100 jarojn post la Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo.

Kiel sciante, la motivo de Zamenhof pri la kreo de Esperanto naskiĝis ja en la iama teritorio de Litova Granda Duklando kaj eĉ nun staras la domo de lia bopatro A. Zilbernik, kiu subtenis la eldonon de la Unua Libro de Esperanto. Iuj diras, ke Litovio estas kvazaŭ la hejmlando de Esperanto. Senrilate al tio, en la kongreslando vi fartu kiel hejme, sed ne kvazaŭ hejme.

Vin ĉiujn varme bonvenigas la unua numero de la kongresa kuriero titolita per *Vilna Sonoro*. La kuriero celas informi vin pri gravaj eroj de la kongreso, necesaj detaloj, neeviteblaj ŝanĝoj en la programo, okazintaĵoj kaj aliaj ĝisdatigoj al la kongreslibro.

La kuriero estu via, do ni bezonas viajn kunlaborojn. Verkemuloj, raportu pri kongreseroj. Ĉiuj respondeculoj pri fakaj kunsidoj kaj aliaj eventoj, plenigu la raportilon pri la evento. Ĝin liveru al la redaktejo aŭ enmetu en la skatolon indikitan por *Vilna Sonoro* ĉe la informejo. Bonvenas viaj anekdotoj interesaj kaj amuzaj rilate al la kongreso kaj ankaŭ fotoj el via cifereca fotilo.

Antaŭdankon pro via kunlaboro!

Choe Taesok

Gazetaro informis amase

Litovaj amaskomunikiloj ja amase informis ĝis nun pri la 90-a Universala Kongreso. Jam multajn monatojn antaŭ la UK ĵurnaloj kaj lokaj kaj tutlandaj multfoje aperigis artikolojn pri la UK kaj ĝenerale pri la Esperanto-movado en Litovio kaj en la mondo.

Ankaŭ ne mankis tia informado ĉe radioj kaj televidoj programoj, kiuj elsendis pri la UK kaj Esperanto. Al tia diskoniga sukceso grande kontribuis la ĉiu-semajna kvinletera informado de la LKK-prezidanto, Povilas Jegorovas.

Transporto por la INAŬGURO

La aŭtobusoj por la **Solena Inaŭguro** (salono Zamenhof en Vilniaus Siemens Arena, Ozo str. 14) ekiras de antaŭ la kongresejo de Reval Hotel (Konstitucijos av. 20) **dimanĉe je la 08h00 kaj 09h00.**

Por la **Nacia Vespero** (Zamenhof) la aŭtobusoj ekiras **dimanĉe je la 18h30 kaj 19h30** de la sama loko (Reval).

Se vi maltrafas, de Real Hotel Lietuva iru kaj transiru la straton Kalvarijų. Trovu la bushaltejon "Žaliasis tiltas" ĉe la samnoma ponto. Veturu per la buso n-ro 10, 26, 26A, 53 aŭ 53A. Eliru en la 5-a haltejo "Pramogų Arena".

Kiel atingi la salonon Bulonjo

en la Kongrespalaco (Vilniaus str. 6/14)

De Reval Hotel iru perpiede al la direkto al Žaliasis tiltas (Verda Ponto). Trapasu ĝin kaj iru al la direkto al Congress Hotel. La sekva konstruaĵo estas nia celo.

Bileto por publika transporto:

Unufoja bileto kostas 80 litovajn centojn. Bileton oni povas aĉeti en la specialaj butikoj kaj kioskoj. Oni povas aĉeti ĝin ankaŭ ĉe ŝoforo, sed ĝi kostas unu lidon. Bileto estas sama por buso kaj trolebuso. Tamen **NE FORGESU validigi ĝin**, enbusiĝinte.

Ekzistas bileto por unu tago – kostas 4 lidojn, por 3 tagoj – 10 lidojn, por 10 tagoj – 20 lidojn. Sed tiujn biletojn oni vendas nur en kelkaj lokoj de la urbo: ĉe la fervoja stacidomo en la kiosko "Vilniaus miesto transporto bilietai" (en la strato Geležinkelio 16), en la busa stacidomo (en la strato Sodų 22) kaj ĉe la Katedralo (en la avenuo Gedimino 2).

Ekzistas mikrobuso. Bileto kostas 2 lidojn kaj ĝin oni aĉetas nur ĉe ŝoforo. Krome, veturas privata buso, por kiu bileto kostas unu lidon ĉe ŝoforo.

Veturo estas malpli kosta per vokita taksio el via hotelo ol per surstrate prenita taksio.

Gazetara konferenco

La unua gazetara konferenco de la kongreso okazos je la 10a horo en la salono Lapenna, sabate, la 23-an de julio, en la kongresejo. Partoprenos Renato Corsetti, Humphrey Tonkin, Povilas Jegorovas.

Cseh-kurso kaj Cseh-seminario

Cseh-kurso kaj Cseh-seminario estas aranĝoj aparte pagendaj. Ĉiu, kiu deziras partopreni, bonvolu pagi ĉe la enirpordo al la koncerna salono. La aliĝintoj nepre havu ĉe si ĉiutage la kvitancon por rajti eniri en la salonon. Se estas interesitoj por observi la funkciadon de la metodo, tiuj rajtas ĉeesti, sed la organizantoj petas ilin resti en la salono de la komenco ĝis la fino de la leciono. Por tiu observado oni devas pagi aparte por leciono kaj tion oni povas fari ĉe la enirpordo.

Rendevua tabulo

Kongresanoj kontrolu regule, ĉu ili havas mesaĝon ĉe la rendevua tabulo. Por pendigi viajn mesaĝojn, vi konsiliĝu ĉe la informejo.

Senpaga parkado

Estas eĉ du eblecoj - unu apud Centra Universala Magazeno (CUP), kiu troviĝas nur ĉirkaŭ 200 metrojn for de la ĉefa kongresejo sur la sama flanko de la strato, la alia estas trans la strato same tre proksime de la kongresejo sub granda aĉetum-centro "Europa".

Sendrata interreta konekto

Kiu havas tian komputilon, kiu ebligas sendratan interretan konekton, povas libere uzi en la kongresejo, en la katedrala placo, en la strato Piliès kaj parte de la avenuo Gedimino. Estas ankaŭ normala drata konekto en ĉiu ejo de la kongresejo.

Mendu ekskursojn

Ankoraŭ mendeblas ekskursoj. Demandu ĉe la ekskursista giĉeto.

Diservoj en Esperanto

Ni invitas jam sabate, la 23-an de julio, en la preĝejon Sankta Rapholus, en la strato Šnipiškių 1; piede 2 minutojn de la kongresejo:

- je 12h15 Ekumena Tagmeza Preĝo
- je 17h00 Antaŭdیمانĉa Sankta Meso kun prediko.

Dum la tuta semajno escepte de dimanĉo kaj ĵaŭdo okazos Diservoj en Sankta Rapholus

- je 08h00 Sankta Meso
- je 12h15 Ekumena Tagmeza Preĝo
- je 17h15 Ekumena Vespera Laŭdo

Dimanĉe okazos

- je 15h00 Ekumena Diservo en la preĝejo Sanktaj Johanoj, en la strato Šv. Jono 12; ĉirkaŭ 30 minutojn de la kongresejo en la antikva urboparto kaj

- je 16h30 Dimanĉa Sankta Meso en Sankta Rapholus

Bernhard Eichkorn, katolika pastro

IKU

La longa tradicio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) estas jam bone konata. Ĝi alportas al la kongreso altnivelan klerigan kadron de prelegoj en variaj temoj. Ankaŭ ĉi-jare la temoj varias - inter astronomio, geologio, matematiko kaj folkloro, sed la plimulto ĉi-jare temas pri lingvistiko.

AIS-IKU

En la naŭdekaj UEA kunlabore kun la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) enkondukis apud la IKU novan iniciaton: kursoj, kiuj estis kombino de IKU prelego kaj daŭrigaj prelegoj pri la sama temo. La kursoj estis prezentitaj kadre de AIS-IKU komuna sesio. AIS-IKU sesio okazis ekperimente en Seulo, sed unuafoje en la nuna formato en la UK en Tampere (1995) kaj preskaŭ ĉiujare poste: en Prago, Montpellier, Berlin, Tel Aviv, Fortaleza kaj lastfoje en Gotenburgo (2003).

En Vilno okazos tri AIS kursetoj, kiuj konsistas el po tri prelegoj: unua enkonduka IKU prelego kaj du daŭrigaj prelegoj, en kiuj la preleganto povos pli profunde kaj vaste prezenti la temon. La enkonduka prelego de ĉiuj tri kursoj okazos dimanĉe posttagmeze, en salonoj Lapenna kaj Berthelot. La daŭrigaj prelegoj okazos marde kaj ĵaŭde, en la urba planetario (salono Poška), proksime de la kongresejo.

IKU libro

Unuafoje en Adelaido (1997) UEA eldonis la tekstojn de la IKU prelegoj antaŭ la komenco de la kongreso, por provizi al la kongresanoj kompletan priskribon de la prelegoj. De tiam la kolekto de la prelegoj aperis broŝurforme ĉiujare. La IKU libro estas aĉetebla en la libroservo, kaj foje en la prelegsalono. Ĝi povas servi kiel referenco kaj por montri la sciencan, fakan kaj edukadan aplikadon de Esperanto ankaŭ al eksteraj instancoj, ekzemple ĉe Unesko kaj scienc-rilataj kaj universitat-rilataj organizaĵoj (tiucele utilas la tradukoj de la prelego-resumoj).

Foto de kongresano



Fotis KN 92

Iuj jam konfuziĝis pro simila aspekto de KKS (maldekstre) kaj LKK-ano, la kongresejestro (dekstre). Do, atentu!

AŬTORAJ DUONHOROJ

Ĉiam okazas en la libroservo (salono Ito Kanzi)

Sabate la 23-an de julio, je la 16h30:

Boris Kolker - pri "Vojaĝo en Esperanto-lando"

Dimanĉe la 24-an de julio, je la 16h30:

Valentin Melnikov - pri lia traduko de "Eugenio Onegin"

Lunde la 25-an de julio, je la 11h30:

Scienca kaj faka duonhora: Christer Kiselman, kiel redaktoro de faka literaturo: Symposium on Communication Across Cultural Boundaries / Simpozio pri interkultura komunikado

Prelegkolekto de samnoma simpozio aranĝita en Gotenburgo post la UK

Esperantologio n-ro 3 / Esperanto Studies

No. 3 (EES 3). La tria numero de periodaĵo por esperantologoj;

Amri Wandel - pri la dua pliampleksigita eldono de "La kosmo kaj ni"

Lunde la 25-an de julio, 16h30:

Aleksander Korĵenkov - pri "Historio de Esperanto"

Marde la 26-an de julio, 11h30:

Mikaelo Bronŝtein pri aperintaj en 2005: "Lundo ekas sabate" - sciencfikcia romano de fratoj Strugackij, kiun li tradukis, "Iam, kiam...", nova originala poemaro kaj ankaŭ novajn kantojn.

Marde la 26-an de julio, je la 16h30:

"La Zamenhof-Strato" tradukita en plurajn lingvojn, kun aŭtoro Roman Dobrzynski kaj eldonistoj por la ĉeĥa, kroata, litova, latva, estona, japana, slovak, slovena (organizita de Spomenka Stimec).

Jaŭde la 27-an de julio, je la 11h00:

Litovio: aŭtoroj de esperantlingvaj libroj rilataj al Litovio: Marc Vanden Bempt, pri "Litova lingvo per Esperanto-okuloj",

Inita Tamoŝiunienė pri siaj poemoj kaj tradukoj, kaj eventuale aliaj aŭtoroj.

Jaŭde la 27-an de julio, je la 16h00:

Istvan Ertl pri la poemaroj "La unufoja lando" (de la litova poeto Tomas Venclova) kaj "Provizore", ankaŭ pri "La postdomo" kaj la tradukoj de "Sen-sorteco" kaj "Ĉu nur-angla Eŭropo?"

Vendrede la 28-an de julio, je la 11h30:

Trevor Steele pri la dua volumo de la romano "La fotoalbumo" kaj pri "Diverskoloro"

Vendrede la 28-an de julio, je la 16h30:

HORI Jasuo pri "Raportoj el Japanio"

Tria eldono de "Vojaĝo" en miaj manoj

Same kiel antaŭ tri jaroj, la aŭtoro ekzemplero de la nova eldono de "Vojaĝo en Esperanto-lando" atingis min en mia naskiĝtago, kaj tio estas la plej kara donaco. Jen mia freŝa impresoj pri ĝia aspekto.

La multe pli granda formato de la libro eĉ pli reliefigas la talenton de la brila grafikisto Francisco Veuthey Francisko Vete: la kovrila foto impresas per sia vivanteco kvazaŭ tridimensia, sennombraj pli-grandigitaj fotoj kaj desegnaĵoj formas unikan albumon de Esperantujo, majstra dezajno kreas festan etoson. La literoj iĝis pli grandaj kaj facile legeblaj. Kompense - la papero estas malpli dika kaj luksa kaj tial la libro iĝis malpli peza (kaj konvena por la poŝta tarifo de sendaĵoj sub 500 gramoj). Sed kio pleje ĝojigis min - la prezo restis la sama, sufiĉe modera por tiaspeca eldonaĵo (mi ja timis, ke ĝi altiĝos je kvarono).

En la sama tago venis entuziasma retletero de Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, kiu skribis, ke dum la unuaj dek tagoj vendiĝis rekorda kvanto de ekzempleroj, kaj ke evidente ankaŭ en la jaro 2005 "Vojaĝo" estos la plej vendita libro en la Libroservo de UEA.

Kelkajn tagojn pli frue la Moskva bardo Mikaelo Povorin sciigis min, ke li verkis muzikon por Valso de vojaĝantoj de Nina Cvileneva, kiu aperis en la lasta leciono de la libro. Mi invitis Mikaelon kanti ĝin dum la prezento de "Vojaĝo en Esperanto-lando", kiu okazos dum la 90-a Universala Kongreso en Vilno, la 23-an de julio, sabate, je 16h30 en la Kongresa Libroservo (programo "Aŭtoro duonhora"). Dum la Universalaj Kongresoj en Fortalezo kaj Pekino "Vojaĝo" estis vendata kun granda rabato. Mi supozas, ke same okazos en Vilno.

Boris Kolker

Alvenis salutoj

... de Imre Szabo el Hungario: "Via kongreso povas esti la unua en la historio, kiun karakterizos firma socia atento, eble ne nur en Litovio, sed en tuta Eŭropo, kiu nun eksoifas pri la neŭtrala, komuna lingvo, kiu ne subpremas la naciajn kulturojn, ne velkigas senpres-tiĝigante la naciajn lingvojn..."

... de Meziane Boukhebou el Alĝerio: "Nome de mi kaj ĉiuj alĝeriaj esperantistoj, mi sendas al vi miajn, sincerajn salutojn, per tio mi ŝatas marki mian, mensan, almenaŭ virtualan, partoprenon en la ĉi-jara kongreso de Esperanto..."

Kongresaj poŝtmarko, filatela folio, koverto

Okaze de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Litova Poŝto eldonis novan poŝtmarkon. Sur ĝi estas la portreto de Ludoviko ZAMENHOF kaj la emblemo de la jubilea UK. La poŝtmarko havas valoron de unu lido (ĉirkaŭ 1/3 de eŭro).

Litova Poŝto eldonis tiel nomatan suveniran filatelan folion. Ĝi estas faldebla en bildkarta formato. Sur la frontpaĝo de la folio estas pentraĵo de Zilbernik-Domo en Kaunas, nun la sidejo de Litova Esperanto-Asocio, sur la dorsa interna paĝo estas trilingva (litova, Esperanta, angla) mallonga kelkfraza teksto pri la 90-a UK, sur la alia interna paĝo estas gluitaj du kongresaj poŝtmarkoj - unu sigelita per speciala kongresa poŝta stampo de la unua tago kaj la alia nesigelita.

Krome, Litova Poŝto aperigis novan koverton, sur kiu estas presita la monumento al Zamenhof kaj estas surgluita la kongresa poŝtmarko.

Ekde sabato la poŝtmarko kaj aliaj filatelaĵoj estas aĉeteblaj en la porokaza poŝtejo, kiu funkcias en la ĉefa kongresejo Reval Hotel Lietuva. Sabate: 12h00-16h00.

Ornamu viajn sendaĵojn per novaj kongresaj poŝtmarko, koverto kaj poŝtstampo.

KLERIGA LUNDO

25 julio 2005

En Gotenburgo kaj Pekino, ni organizis en la kadro de la Universala Kongreso specialan kaj tre sukcesan klerigan tagon, en kiu okazis plej diversaj kunvenoj - pri la lingvo Esperanto, pri ĝia historio, pri la kongresa lando, pri novaj metodoj de informado, pri kiel organizi kongresojn, ktp. Multaj kongresanoj partoprenis (verŝajne eĉ plimulto de la kongresanoj), kaj sekve iris hejmen kun novaj ideoj kaj nova entuziasmo. En Vilno ni denove prezentas nian Klerigan Tagon. Ni invitas vian partoprenon....

El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn en la skatolo ĉe la informejo kaj en la redakcia salono Rosbach kaj per retpoŝto: kuriero@esperanto.lt. La redaktotino por la venonta numero: sabate je 16h00.

La kurieron oni povas legi en la PDF-formato ĉe <http://esperanto.lt/board/zboard.php?id=kuriero>.

Petras Čeliasukas, LKK-ano pri la kongresa kuriero, Honora Membro de UEA, malsanas kaj ni bondeziras al li baldaŭan resaniĝon.

Ĉi tiun numeron redaktis Choe Taesok, Meĉislovas Grikpėdis, Reza Torabi, Vida Čojienė, Indrė Pileckaitė.

UTILAJ INFORMOJ



Poŝtaj afrankoj

	Al eksterlando	
	simpla	prioritata
Poŝtkarto	1,00	1,20
Letero ĝis 20 gramoj	1,30	1,70

Afrankoj por sendaĵoj al eksterlandoj ne dependas de distanco nek de kontinento, kaj do estas egala ĉu al najbara Latvio, ĉu al fora Aŭstralio.

Komparo de lidoj kaj eŭroj

Lidoj	Eŭroj	Lidoj	Eŭroj	Lidoj	Eŭroj
0,10 =	0,03	2 =	0,58	10 =	2,90
0,20 =	0,06	3 =	0,87	20 =	5,80
0,50 =	0,14	4 =	1,16	50 =	14,49
1 =	0,29	5 =	1,45	100 =	28,99

Gravaj litovaj vortoj kaj frazoj

Saluton - **Sveiki** [svejki']
Bonan matenon - **Labas rytas** [la'bas ri'tas]
Bonan tagon - **Labas diena** [la'bas djena']
Bonan vesperon - **Labas vakaras** [la'bas va'karas]
Dankon - **Aĉiū** [a'ĉju]; **dėkui** [de'kuji]
Multan dankon - **Aĉiū labai** [a'ĉju labai']
Ne dankinde - **Nėr už ką** [ner už ka']
Mi petas - **Prašau** [praŝau']
Bonvolu - **Prašom** [pra'ŝom]
Mi dankas - **Dėkoju** [deko'ju]
Mi pardonpetas - **Atsiprašau** [atsipraŝau']
Pardonu - **Atleiskite** [atlejs'kite]
Ĉion bonan - **Viso labo** [vi'so la'bo]
Ĝis revido - **Iki pasimatymo** [iki' pasima'timo]
Adiaŭ - **Sudie** [sudje']
Jes - **Taip** [tajp]
Ne - **Ne** [ne]
Bone - **Gerai** [geraj']
Tre - **Labai** [labaj']
Malbone - **Blogai** [blogaj']
Mi volas - **Aš noriu** [aŝ no'rju]
Mi ŝatas - **Aš mėgstu** [aŝ meg'stu]
Mi ne komprenas - **Aš nesuprantu** [aŝ nesuprantu']
Kafo - **Kava** [kava']
Teo - **Arbata** [arbata']
Biero - **Alus** [alus']
Kafejo - **Kavinė** [kavi'ne]
Trinkejo - **Baras** [ba'ras]
Restoracio - **Restoranas** [restora'nas]
Kiom kostas - **Kiek kainuoja** [kjek kajnuo'ja]